

Germana Esperantisto

Der Deutsche Esperantist

Oficiala Organo de
Germana Esperanto-Asocio (G. E. A.)
kaj de aliaj esperantistaj unuiĝoj

Aperas duonmonate en du alternantaj eldonoj:
Eldono A (Propagando) — Eldono B (Literaturo)



Offizielles Organ des
Deutschen Esperanto-Bundes E. V.
und anderer Esperantisten-Vereinigungen

Erscheint halbmonatlich in zwei abwechselnden Ausgaben:
Ausgabe A (Propaganda) — Ausgabe B (Literatur)

Abonprezo: por jaro 2.400 Sm. (Provabono por duonjaro, komen-
ciĝanta en Januaro kaj Julio, 1.200 Sm.). Ĉiu eldono aparte:
1.200 Sm. (0.600 Sm.). **Anoncoj:** Vidu tarifon sur la kovrilo

Bezugspreis: für ein Jahr 4.80 M (Probeabonnement für ein Halb-
jahr, beginnend im Januar und Juli, 2.40 M). Jede Ausgabe ein-
zeln: 2.40 M (1.20 M). **Anzeigen:** Siehe Tarif auf dem Umschlag

Alsenditajn artikolojn la redakcio laŭ bezono korektas. Nepresitajn manuskriptojn ni redonas nur, se oni aldonis poŝtmarkon por la resendo

11^a Jaro N^o 12 B (166)

Eldonejo kaj Redakcio: Dresden-A. 1, Struvestr. 40

Decembro 1914

Enhavo: Al niaj legantoj! — La milito kaj Esperanto —
Germana Kristnasko 1914 — La disiĝo — Vizito
al ĝardenurbo — Sporto en Jamajko — La grenadistoj (Versaĵo)
— El la vivo kaj sciencoj — Lingvaj demandoj — Tra Espe-
rantujo — Diversaj komunikoj — Bibliografio — Por lertuloj
— Anoncoj

Al niaj legantoj!

Kiam en Julio de tiu ĉi jaro la paco estis rom-
pata kaj kvazaŭ fulmo el sennuba ĉielo ankaŭ por
Germanujo komenciĝis milito, tiam pli ol unu el nia
samideanaro pensis, ke la Esperanto-movado estas
haltigita aŭ eĉ, ke Esperanto ne postvivos la militon.
La unuaj ekscitigaj tagoj en Aŭgusto ja nur povis
plifortigi tiajn timajn konjektojn, kaj kiu ne posedas
la feliĉan kvaliton, konsideri la bonon de iu afero
kiel la pli verŝajnan solvon, tiu des pli rapide sen-
kuraĝiĝas.

Sed kiel en realeco ĉio disvolviĝis? Post pasanta
malkuraĝiĝo sin montris duoble forta volo, ne inter-
rompi la multjaran laboron bone sukcesintan, sed
energie persisti kaj se iel eble pliproksimigi Esperanton
al ĝia celo. Kvankam multaj germanaj esperantistoj
sekvis la vokon de sia imperiestro kaj nuntempe mili-
tadas, kaj kvankam pro tio pli ol unu grupo nun mal-
havas sian spertan estron, tamen troviĝis rapide labor-
amaj esperantistoj, kiuj konformigas sian agadon por
Esperanto al la nunaj tempoj kaj tiamaniere faras
valorajn servojn al la patrolando. Ĉi tie ni nur mal-
longe tion citas, ĉar la tuta gazeto en eldono A
denove enhavas detalajn raportojn.

Malgraŭ sufiĉe da malfacilaĵoj ni restis sur nia
posteno. Simile al ŝipo, kiu sur la vasta maro devas
venki kontraŭ ventego, ni en tiu ĉi peza, sed tamen
anim-fortiga tempo ĝin opinias nia devo kaj tasko,
per nia ĵurnalo konservi la rilatojn inter la esperan-
tistoj kaj komuniki tion, kion ni ĉiuj sentas. La mi-
lito regas nian pensadon; tial ankaŭ ni en nia gazeto
ĉefe nun okupas pri la nunaj okazaĵoj, lasante tamen
netraktata la politikon. Niajn amikojn en la militejo
ni ĝojigas per tio, ke ni sendas al ili ambaŭ eldo-
naĵojn de Germana Esperantisto. Kiom dankaj ili

por tio estas, montras iliaj dankskriboj. Nia sami-
deano S-ro August Omlor jun. el St. Ingbert priskribas
en letero al ni speciale vigle la impresojn, kiujn li
havis je ricevo de nia sendaĵo. Speco de malsatego
lin kaptis, ekscii post longa paŭzo ion pri nia movado.
Nur leginte la tutan, amatan de li gazeton de komenco
ĝis fino, li ĝin formetis. Feliĉe li havis ripozo-tagon,
kiu ebligis al li detalan okupon pri Esperanto en la
pafista fosaĵo.

Denove unu jaro proksimiĝas al sia fino. Tio
ĉiujn esperigas por la estonteco. Ni deziras kaj petas,
ke la rondo de niaj legantoj restu fidela kaj ankaŭ
dum la venonta jaro kuniĝu en komuna laboro, por
ke ni, kiel ĝis nun, plenumu nian taskon.

Nun ni ankoraŭ havas la agrablan devon, danki
S-ron Friedrich Ellersiek en Berlin pro lia efika kaj
oferema agado kiel redaktoro de nia gazeto; ni ĉiam
tre ŝatis lian laboron. Bedaŭrante lin perdi kiel re-
daktoron, ni tamen esprimas nian ĝojon, ke li pro-
ponis sian kunlaboradon. Tiamaniere ni povos havi
inter li kaj ni la samajn agrablajn rilatojn kiel antaŭe.

*Eldonejo kaj redakcio
de Germana Esperantisto*

La milito kaj Esperanto

Ĉiu bone scias, ke milito haltigas progresadon
de kultura vivo. La bonegan ilustradon de tiu
fakto ni trovas en la libro de Berta von Suttner:
„For la batalilojn!“ Jen kion ŝi skribas pri la
kultura stato de Aŭstrio dum ĝia milito kontraŭ
Italujo en la jaro 1859:

„Survoje mi eniris libro-kaj artaĵvendejon, por
aĉeti novan karton de Supra Italujo, la mia estis jam
tute truita per la flagpingloj. Ĉeestis krom mi ankaŭ
aliaj aĉetantoj. Ĉiuj postulis kartojn, skemojn kaj
tiuspecajn objektojn. Nun estis mia vico.

— Ĉu vi ankaŭ deziras militscenejojn? — de-
mandis la librovendisto.

— Vi divenis.

— Ne estas malfacile. Oni aĉetas preskaŭ ne-
nion alian.

Li alportis la deziritaĵon, kaj dum li enpaperigis la karton por mi, li diris al sinjoro, staranta apud mi:

— Vidu, s-ro profesoro, nun malprosperas tiuj, kiuj verkas literaturajn kaj sciencajn librojn, aŭ ilin eldonas—neniu ilin mendas. Dum la daŭro de la milito neniu interesiĝas pri la intelekta vivo. Estas malbona periodo por la verkistoj kaj libristoj.

— Kaj malbona periodo por la nacio, — rediris la profesoro, ĉar tia indiferenteco kaŭzas spiritan ruiniĝon.

— Via negoco do ne prosperas? — mi nun laŭte diris.

— Ne nur la mia. Ĉiuj, preskaŭ ĉiuj, via sinjorina moŝto, — respondis la libristo. „Esceptinte la militajn liverantojn, ne estas komercisto, al kiu la milito ne alportas gravan malutilon. Ĉio haltas: la laboro en la fabrikejoj, la laboro sur la kampoj, senombraj homoj estas senigitaj je gajno kaj pano. La mon-paperoj falas, la aĝio supreniras, ĉia deziro al entrepreno malaperas, multaj firmoj bankrotas — unuvorte, estas mizero — mizero! . . .“

Por priskribi la nunan staton de ĉiuj militantaj nacioj, venkantaj kaj venkataj, ni ne bezonas elpensi novajn vortojn, novajn frazojn, novajn bildojn! Sufiĉas forstreki la jaron 1859 kaj skribi la jaron 1914.

Ni volas nur iom klarigi la frazon: „multaj firmoj bankrotas“. Tio okazas ordinaro pro la neatendita malpliigo de la spezo. Ni imagu, ke iu firmo havis 15 000 sm. spezon. Tia spezo estis donanta 3600 sm. da malneta profito. Per ĉi tiu profito estis pagataj necesaj elspezoj: por la loĝejo, la salajroj, la impostoj k. t. p. Sed jen subite la spezo falas ĝis 3000 sm., la malneta profito ĝis 750. La posedanto de la firmo jam ne povas pagi ĉiujn ŝuldatajn sumojn, li iras peti krediton en la bankoj, sed tie oni respondas: ĉe ni ankaŭ mankas la mono k. t. p. Tiam staton oni nomas „ekonomia krizo“; ĝi tuŝas ĉiujn sferojn de socia vivo ĉe la militantaj nacioj kaj tiamaniere sekvigas multajn bankrotigojn.

La krizo ne preteriris ankaŭ la esperantistan vivon. La esperantistoj, kiuj estas alvokitaj al la milito, jam ne povas labori por Esperanto. Kaj la ne alvokitaj esperantistoj tiom entuziasmiĝis pro la milito, ke ili legas nur sciigojn pri la bataloj, aĉetas diversajn militkartojn kaj tute forgesis pri la ordinara kultura laboro.

Sur siaj postenoj restis nur malmultaj esperantistoj. Ili streĉas ĉiujn siajn fortojn, por ke ne falu kaj ne ruiniĝu la komencitaj, sed ne finitaj konstruaĵoj. Ili paciencie daŭrigas sian laboron. Sed iliaj fortoj ne estas senfinaj.

Do, ni alvokas: *rememoru pri via kultura laboro, rememoru pri via esperantista devo!*

Pri diversaj institucioj de la milito zorgas milionoj da personoj, ilin subtenas miliardoj da mono. En tute alia situacio estas niaj institucioj. Estante tre junaj, ili bezonas seninterrompan subtenon. Sen helpo ili povas pereji. Ne lasu ilin solaj. Ili funkcii, kiel funkcias la regnaj, zemst-

vaj kaj urbaj institucioj. Per serioza rilato al nia afero ni montru, ke ĝi ne estas amuzilo aŭ ludilo. Ni restu sur niaj postenoj!

A. S. El „Ondo de Esperanto“ (Oktobero 1914)

Germana Kristnasko 1914

Ĉu ni festos Kristnaskon ĉi tiun jaron? Tiel ni nin demandis en la komenco de la vintro. Ĉu decas festi en varma, hele lumigita ĉambro ĉe ornamita abio aŭ pinarbo, en gaje kuniĝinta familia rondo, dum niaj filoj, fratoj, edzoj estas malproksimaj en konstanta danĝero de l' vivo? Ĉu decas kanti en preĝejoj pri „Paco sur tero“ dum la furiozado de terura milito? Ĉu ni povos ĝui nur unu minuton da festa sento, dum la karuloj aŭdas la fajfadon de la kugloj? Ŝajnis neeble! — Anstataŭ, kiel en aliaj jaroj, pripensi Kristnaskon, oni pensis al la bezonoj de la armeo. Grandaj firmoj kaj privatuloj, riĉuloj kaj malriĉuloj donacis monon kaj objektojn. Tre agemaj sin montris la virinoj, ilia patrino sento instigis ilin al plej energia laboro. Ili ne povas helpi al la viroj defendi la patrujon per pafiloj kaj armiloj, sed ili povas mildigi la teruraĵojn en la plej diversaj manieroj. Ili anstataŭas la virojn en la hejmo, ili flegas vunditojn, ili sendas „amdonacojn“ al la batalantoj. De la milit-komenco la virinoj organizis grandiozan laboron. Dum kvar jarcentoj da virina movado ili ion lernis. La poŝtaj kaj fervojaj transportiloj estis devigataj efiki gigantan laboron. Dum la tuta monato Novembro amasegoj da „amdonacoj“ estis forsendataj okcidenten kaj orienten, oni nin ja atakis je du flankoj.

En Novembro oni antaŭ ĉio forsendis varmajn subvestojn, en Decembro sekvis regalaĵoj. En ĉiuj nordaj landoj varmaj vestoj kaj bongustaĵoj nepre apartenas al la Kristnaskaj donacoj. Ĉiu germana regiono havas sian apartan festbakaĵon, ĉiu patrino forsendas provizon da ĝi al la milit-kampo. Ĉiuj inaj manoj denove vigle laboras, kompreneble ankaŭ la filinetoj helpas; ankaŭ ili trikis kaj kudris laŭ povo. Sed ni ne forgesu la knabojn. En la lernejoj ili kolektis monon, la patrinoj kaj fratinoj donis al ili ŝtrumpojn kaj mufetojn. Ili aĉetis ruĝajn kandelojn, kukojn kaj cigarojn, en la desegna leciono ili kreis bildojn, kiuj montras kristarbojn ornamitajn. Unu matenon ili ne havis lecionon. En la klaso staris kestoj plenigitaj de la diligentaj manoj de la knaboj, eĉ sen la helpo de panjo. Inteligenta knabo ĉion devas lerni, li ja ĉiutage aŭdas, kion mem faras niaj soldatoj en la pafista fosajo.

Fine! Nur nun la germaninoj komencas pripensi la hejman feston. La etuloj devas havi sian

Kristnaskon eĉ en tiuj familioj, kiuj funebras pro falinta en la milito heroo. Al malriĉaj infanoj oni donos kiel eble plej riĉan donacon. Por la lazaretoj oni pretigas belan feston kun bonega regalo, multaj floroj, muziko kaj gigantaj abioj. En la preĝejoj oni aŭdos mildajn, konsolajn vortojn, kiuj denove fortigos la korojn dum tiu ĉi milito. Venu, ho revenu sankta

Paco sur tero!

Marie Hankel

La disiĝo

Skizo de *Hanns Eddé*, Dresden

Kaj nun ĉiu estis atinginta sian celon.

Temas pri la konata priadulta historio ofte rakontata, pri kiu ŝercemuloj tiel volonte ridas, kaj pri kiu unuj ridetas, aliaj indignas, kiam oni rakontas ĝin.

Nun ili staris antaŭ la juĝisto.

Kiu el ili estis efektive kulpa? Kiu estis komencinta? Ĉu ŝi ne estis trovinta leterojn, kies enhavo ne decidis al viro edziĝinta? Kaj kion li estis respondinta? „Ni verkistoj, ni artistoj havas animojn pli delikatajn ol la aliaj homoj, kaj eĉ la plej simpla homo serĉas samidealanojn. Ĉu oni ne permesas al la artisto fari la samon, ĉu ne ankaŭ li serĉas estaĵojn, kiuj egalas aŭ eĉ superas lin? Se iu el ni, kiuj vivas por kaj per ĉio bela kaj bona, ne farus tion, li sufokiĝus en la unutoneco de la ĉiutaga vivo. Li perdis la altajn idealojn, kiujn aliaj povas montri al li. Li ne vidus ilin, lia sfero fariĝus ĉiam pli malvasta, li fariĝus kvazaŭ maŝino perlaboranta la vivtenon. Kaj ĉu estas mia kulpo, ke tian noblan animon posedas virino, kiu ne estas mia edzino — virino, kies opinioj, idealoj, pensoj harmonie kunfandiĝas kun la miaj?“

Kaj li estis ŝin rigardinta riproĉe kaj estis foririnta, eble al la alia

„Kial vi elektis min kaj ne iun alian virinon, kiu anime superus vin; kial vi malfeliĉigis min?“

Tion ŝi intencis diri, sed ŝi silentis. Ŝi bone sciis, ke, pensante pri sia beleco kaj riĉeco, ŝi multe tro rapide estis konsentinta fariĝi lia edzino. Kiel fiera ŝi estis, kiam ŝi fariĝis la edzino de la famekonata verkisto Dro Karsen, kies verkoj estis tre ŝatataj. Aliflanke ŝia beleco entuziasmigis lin en la unua tempo, kaj la edziĝo garantiis al li brilan estontecon, kiun li preferis al la neregula artista vivado. Krom tio li havis ŝuldojn.

Poste ili ambaŭ ekvekiĝis el la dolĉa sonĝo de reciprokaj prikalkuladoj, la mallongedaŭra har-

monio estis detruata. Li ĉiam pli bone ekkonis, kiel multe ŝi malsuperis lin. Ŝiaj malpravaj juĝoj kaj opinio pri liaj verkoj ĉagrenegis lin kaj tute detruis la reston de amo, kiun li ankoraŭ sentis por ŝi. Kaj kiam li ofte vidis ŝin kun unu el ŝiaj iamaj amikoj, kiu estis simpla, ne eminenta homo, kaj kiu havis profesion respondan al sia kapablo — li estis oficisto en la ministrejo —, kaj kiam li vidis, kiel ŝiaj trajtoj ĝoje plivigliĝis dum la ĉeesto de ŝia amiko, tiam li eksentis la sinceran deziron: for de tiu virino!, for tiun ŝarĝon, kiun mi metis sur min!

Kaj ŝi, antaŭe bonkora, modesta edzino, vidis kun teruro la rilatojn inter sia edzo kaj la aktorino Verdin, vidis la adultan amon, kiun li poezie nomis „interrilatoj de l' animoj“ kaj komencis siaflanke preskaŭ senpripense amaĵon kun tiu amiko, kiu nun povis entuziasmigi ŝin multe pli ol tiu ĉi „superhomo“.

La prezidanto petis, ke oni rakontu al li ĉion detale. Ambaŭ havis lertajn advokatojn, kiuj plej elokvente pledis pri la okazintaĵoj de tiu edziĝeraro, tial je la fino de la pledadoj, kontentige por ambaŭ partioj, oni decidis la eksigon de la edziĝo.

Antaŭ la juĝejo ili ankoraŭ unufoje renkontis unu la alian.

Post la pledadoj ĉiu el ili estis parolinta kelkajn minutojn kun sia advokato, tial ili forgesis la disiĝon, ili forgesis diri adiaŭ unu al la alia. Kaj nun sur la strato li ankoraŭ unu fojon vidis la belan altkreskan figuron de sia iama edzino, li ankoraŭ unu fojon vidis ŝian noblan profilon, kiu estis ravinta tiel multe liajn okulojn, la malgrandajn, preskaŭ diafanajn manetojn kaj la malfortan rigardon de ŝiaj de ploro vualitaj okuloj.

Li iris renkonten al ŝi. „Mi volus danki vin, ke vi tiel multe faciligis al mi nian disiĝon“, li diris serioze, „sed mi pensas, ke tio ne estas necesa, ni helpis unu la alian intencante disiĝi. Ni kune prilaboris tiun faron kaj ĝi sukcesis. Mi devus peti vian pardonon pro multaj aferoj, sed ankaŭ vi havus la saman devon. Kiel virino — kaj lia voĉo sonis pli mole — vi restis por mi la sama, eĉ ankoraŭ nun. Mi edzinigis la virinon, kiu bela staris antaŭ mi, same kiel nun. Sed mi edzinigis nur virinon kaj vi egoisme elektis la famekonatan verkiston, kvankam vi ne sciis, kio estas necesa por daŭre ravi artiston. Sed sufiĉas. Feliĉiĝu, eble ankaŭ mi fariĝos feliĉa. Kaj ni forgesu niajn erarojn.“

Li estis parolinta trankvile kaj objektive.

Anstataŭ la respondo ŝi etendis sian maneton, la ĉarman maneton, kiun ŝi antaŭe sengantigis. Li premetis la maneton kaj kisis ĝin same, tute same, kiel li kutime kisis la manojn de belaj virinoj.

„Adiaŭ“.

Li per la okuloj sekvis ŝian aŭtomobilon, kiu supozeble veturis al la ministrejo, kaj nun li alvokis fiakron per petola gesto, kvazaŭ li estus trapasinta ekzamenon kaj nun intencus militakiri la tutan mondon.

„Teatron“, li vokis al la veturigisto.

La disiĝo okazis por ĉiam.

Post kelkaj jaroj

Kontraŭ la frontonaj fenestroj de la mansardaj loĝejoj en la „preĝeja strateto“ blovegis la decembra ventego. Ĝi bruskuis kaj premegis la ŝanceliĝantajn vitrojn kaj la malfirmajn tegolojn sur la tegmentoj.

La domoj en la preĝejstrateto ne estis zorge konstruitaj, ĉar la tuta kvartalo, kiun zigzage trairis la strateto, ne estis la plej moderna en la ĉefurbo.

La malhela brilo, kiu vespere timeme elĝadis el tiuj pormalriĉulaj loĝejoj, estis estingita.

Nur tra unu el tiuj malaltaj fenestroj la lumo eliĝis en la malvarman vintran nokton, tial la neĝeroj scivole kolektiĝis kaj haltis antaŭ la fenestreto, dancadis supren kaj malsupren, lumigataj dum sekundoj per la brilo de la lampo. Supozeble en la ĉambreto estis io eksterordinara, ĉar ĉiam denove la neĝeroj revenis, ĉiam denove ili ekdancis, kaj eĉ la petolema vento, kiu ĝenerale atentis pri nenio, ĉesis fajfadi kaj aŭskultis.

Malalta estis la ĉambreto, mallonga kaj mallarĝa. La oblikvaj muroj kvazaŭ premis la malmultajn objektojn.

La malhela brilo de la malnova lampo, kiu havis cilindron parte rompitan kaj kloŝon rompitan, treme tuŝis la eluzitan kovrilon de la tablo kaj la nudajn, per kalko blankigitajn murojn, ĝis kiam ĝi atingis la vermopikitan, paliĝintan sofon, sur kiu kuŝe ripozis virino — virino, kies iam ĉarmaj trajtoj multe ŝanĝiĝis, kies delikataj manetoj kontrastis la fadenmontrajn aĵojn, kuŝantaj apude sur seĝo. Kaj ĉe ŝia flanko sur kraketanta seĝo sidis li, la iam fama, multe aplaudita Karsen. Li estis kovrinta la vizaĝon per la manoj: la enkorpiĝo de mizero.

Nur la singulta plorado de la viro tute klinata kaj la denova ekfajfado de la vento interrompis la silenton de la ĉambro, la sola ĉambro de Karsen, eĉ horloĝo mankis, tiel multe li malriĉiĝis, kaj tiaj ili revidis unu la alian: li kaj ŝi.

Li pensis pri sia estinteco. Verdin, la aktorino, forlasis lin antaŭ longa tempo, kiam li malsukcesis. Kaj tiam lia voĉo interna ekparolis, unue tute mallaŭte, poste ĉiam pli laŭtigante, de tago al tago pli potenciĝante, pri la amo al lia iama edzino, pri ŝia modesta, bonkora karaktero,

kiun li ne ĝuste ekkonis, kiun li ne povis ĝuste ekkoni pro sia senlima troa memfido kiel artisto. Tiam li eksentis abomenon kontraŭ ĉio, kio estis nomata arto. Li nur sopiris propran trankvilan hejmon. Dum tiu interna malpaco li reveme prilaboris diversajn verkojn, sentante abomenon kaj sopiradon en la koro, kvankam li vidis kiel malesperiga fariĝis la estonteco, kiel la ŝuldoj konstante kreskadis.

Unu tagon terura timo estis kaptinta lin. Li estis kureginta al la kanalo, ne sciinte, kion li faris. Li serĉante kuris tien kaj reen kaj ne sciis, kio estas trovota. Li tie vagadis dum ok tagoj. Tiam ŝi estis aperinta subite, lia iama edzino. Li volis iri renkonte al ŝi, sed ŝi ne vidis lin, ŝi kuris al la kanalo, kaj jen li vidis eksalton, li aŭdis krion — kaj la teruraĵo okazis. Tuj li ŝin sekvis en la malvarmegan akvon kaj portis ŝin poste en sian ĉambon.

Sen konscio, kvazaŭ mortinta, ŝi kuŝis antaŭ li, kaj kiam ŝi malfermis la okulojn, ŝi flustris*) lian nomon, tiel mallaŭte, preskaŭ ne aŭdeble. Kaj tamen tiu vorto frustrata pli feliĉigis lin ol glorkanto kantata de anĝelaro. Li ĉesis vidi sian mizeron, sian malvivindan estontecon, li estis kun ŝi, li denove posedis ŝin.

Kaj li petis, ke ŝi rakontu al li ĉion — ĉion.

Post la eksedziĝo kaj la nova edziĝo ŝia dua edzo ĉesis labori en la ministrejo, spekulaciis kaj komencis ludi „hazardon“. Tio daŭris kelkajn jarojn, ĝis kiam li estis perdinta ĉion kaj nun ŝi, la iam riĉa virino, estis malriĉega.

Sed ĉio ĉi signifis nenion, komparate kun ŝiaj animaj turmentoj kaj ŝiaj sopiradoj: ŝi aŭdis pri la mizero de Karsen kaj pri lia pasia amo al ŝi. Centfoje ŝi decidis viziti lin kaj ĉirkaŭbraki lin. Sed ŝi ja nun estis la edzino de alia viro.

Li ĝemante ekvekiĝis el la sonĝo, depost ok tagoj li nun dormetis la unuan fojon.

Jen ŝi kuŝis antaŭ li kvazaŭ anĝelo. La blonda hararo onde kovris ŝiajn ŝultrojn, kaj la neĝblanka delikata maneto kuŝis sur la ruĝa kovrilo.

Li karese tuŝis tiun maneton. Ĝi estis malvarma. Li rigardis ŝiajn knabinecajn noblajn trajtojn kaj kliniĝis por kisi ŝiajn ĉarmajn, nur iom palajn lipojn. Ili estis glacie malvarmaj. Emociita li disigis sian manon de tiu maneto, repaŝis kaj fikse rigardis ŝin — longan tempon — tre longan tempon.

Tiam teruraj fantomoj atakis lin, el ĉiuj anguloj de la ĉambro li aŭdis la vorton „mortinta“, la vento siblegis kaj fajfis, la tegoloj klaketante

*) flustri: germane = flüstern, angle = to whisper. Vorto uzata en La Revuo, 7a jaro, n-ro 1, pĝ. 37 kaj n-ro 2, pĝ. 67.

akompanis ĝin kaj lia koro ĝemante ripetadis: „mortinta, mortinta — por ĉiam disigita — la duan fojon“.

Dum kelkaj horoj li konsternite rigardis ŝin. Li ne rimarkis, ke la nokto jam estis pasinta, dum la lampo sur la tablo fumigante estingiĝis. Li sidis apud la mortinta virino, ŝian manon en sia: viro frakasita de l' sorto, kaj liaj lipoj murmuretadis: disigita por eterne.

Subite li leviĝis kaj per la mano tuŝis sian varmegan frunton. Li strange ridetis: „Ne, ne ekzistas disiĝo. Niaj animoj neniam estis disigitaj, kaj ili ĉiam restados kune. Ho, malgraŭ ĉio mi nun sentas, kion signifas disiĝo, mi scias, kio estas vera disiĝo.“

Sed tamen ne ekzistas disiĝo, ne“

Li palpe tuŝis sian poŝon. Tie li portis pafilon uzotan en la plej malesperiga momento, — en la plej malesperiga momento.

„Mi sekvas vin“, li diris firme, „ne ekzistas disiĝo“.

Kaj li ridetis, ridetis same gaje, same anĝelece, kiel ŝi, la virino mortinta. —

Kaj tiam ĝi estis okazinta.

Kun permeso de la aŭtoro el germana lingvo tradukis

Albert Brändel

Vizito al ĝardenurbo

De Twells Brex

(Eltiraĵoj el „The Daily Mail“, 1913)

Antaŭ naŭ jaroj mi en somera posttagmezo preterpasis la vilaĝeton *Letchworth*, en Herts (Anglujo), kaj rimarkis kelkajn fosajojn sur la supraĵo de la soleca kamparo. „Kion oni faras ĉi tie!“ mi demandis maljunan kamparanon.

„Oni ja diras, ke iuj malsaĝuloj revas pri konstruo de „ĝardenurbo“, — kion ajn tio signifas. Malsaĝuloj kaj ilia mono baldaŭ disiĝos.“

Antaŭ kelke da tagoj mi ree iris al *Letchworth* kaj staris sur la sama loko. Mi demandis min, ĉu la maljunulo ankoraŭ vivas kaj vidas tion, kion jam atingis la „malsaĝuloj“?

* * *

Dum mi eliris el la stacidomo, bela knabo amigis al mi *Letchworth'on*. Li havis aĝon de dek du jaroj. Fulmrapide li venis, desaltante de biciklo, similante grekan knabon pli ol tiun, kiun mi iam vidis, sage rektkorpa, forta kaj vigla, kun la kampara suno sur brunigitaj vangoj kaj la monteta aero en siaj fortikaj membroj, kaj, la ĉielo nur scias, kun kia malproksime prapatra lumo en siaj mirindaj, violkoloraj okuloj. Li disvendis gazetojn.

Certe la urba kompanio devus kelkfoje teni lin ĉe la stacidomo, por ke li estu reklamilo, kiu montras, kia povas fariĝi knabo kreskanta en ĝardenurbo.

* * *

La propono, konstrui ĝardenurbojn, kaj la planoj por ilia kreskigo estis faritaj de S-ro *Howard* en 1898; la unua ĝardenurba societo fondiĝis en 1903. Ĝia celo estis decentra distribuado de loĝantaro, kaj kontraŭ-alcentriĝo, eviti la senordan, amasan densiĝon de la ordinaraj urboj.

Neniu el la ĝardenurboj, kiuj sekvis *Letchworth'on*, estas ĝardenurboj en la senco de tio, ke ili estas tute novaj kaj kompletaj urboj en la sendoma kamparo. Ili estas nuraj pligrandigoj de jam ekzistantaj urbaj regionoj. La unua impresio, kiun oni havas pri *Letchworth*, estas, ke ĝi estas „ĉiuspecula“ urbo, ĝojanta pri la veno de ĉiuj klasoj kaj perlaborantoj, donanta lokon al ĉiuj.

La fabrikejaj, butikaj kaj loĝejaj partoj estas specialaj kaj apartaj, sed la ĝojo de kampara vivo sin trovas en ĉiuj. Nur unu trionon de la ses kvadrataj mejloj oni uzas kiel urbon, sur la restantaj du trionoj troviĝos parko, golfiejo aŭ agrikultura kampo.

S-ro *Howard* promene kondukis min tra ĉi tiu eta urbo de jam 8000 homoj. Spite de plej melodrama printempa fulmotondro ĝi havis brilan aspekton. Ĝia brileco estas tia, kian ĉiam donas larĝaj vojoj kaj grandaj, sendomaj terspacoj. *Letchworth* kopiis mikrokosme la belecon de Parizo. Ĉi tiuj larĝaj vojoj kaj grandaj, sendomaj placoj estos ankoraŭ pli belegaj, kiam *Letchworth* dolĉe maturiĝos ĉirkaŭ ili.

Konstruaĵoj nun estas novaj, la tilioj estas arbetoj, kaj la ĝardenoj estas junaj. Sed tre agrabla estas la juna, naŭjara *Letchworth* kun tia aspekto de libertempaj urboj, kiujn oni konis. Tre bela estas ĝia kvazaŭ kvietaj, ĝoja ĝentileco, ĝiaj bone prizorgataj vojoj kun arboj kaj laŭboj, ĝiaj artecaj dometoj kun flirtantaj fenestraj kurttenetoj kaj ame sarkitaj ĝardenoj.

Sufiĉe rimarkinda estas la praktika kaj korporacia kreskado de *Letchworth*. Ĝi posedas propran akvoservon el akvujo sur la montetoj, elektrejon kaj gasfabrikejon. Ankaŭ en ĉi tiu urbo, kiu tiel malsimilas fabrikejan urbon kaj kiu neniam similos tiajn urbojn, jam sin trovas preskaŭ kvindek fabrikejoj kaj laborejoj. Ekzistas dek mejloj da novaj vojoj, 15^{1/2} mejloj da ĉeftuboj por akvo, 14 mejloj da ĉeftuboj por gaso, 13 mejloj da drenoj, 1515 domoj kaj butikoj, 4 preĝejoj, 4 publikaj ĉambregoj, kelkaj bankoj, kinematografejo, naĝbanejo, lernejo, 3 klubejoj, telefonservo kaj nova poŝtofiĉejo, pri kiu fieras la *Letchworth'anoj*.

Nia promeno tra la ĝardenurbo finiĝis en la kvartalo, kie loĝas la industriaj dungitoj. Jen

estas metiistaj dometoj, kiuj aspektas kvazaŭ etaj vilaoj. Ĉiun el ili, lueblaj por $2\frac{1}{2}$ ĝis $3\frac{1}{2}$ spemiloj, ĉirkaŭas granda plenaera ĝardeno. Ili estas sufiĉe proksime al la fabrikejo, por ŝpari vojaĝtempon; sed la fabrikeja teritorio ne tuŝas ilin. Krom per sia malgrandeco ili ne distingiĝas de la domoj en la riĉula kvartalo. Oni ĉi tie ankaŭ vidas la larĝajn kaj bone prizorgatajn stratojn kaj ankoraŭ la grandajn, sendomajn terspacojn.

Ne ofte okazas, ke revanto vidas siajn revojn tiel sendifekte efektivigantaj. S-ro Howard, loĝante en sia ĝardenurbo, povas vidi el sia domo la revojn, kiuj realiĝis. Rigardante al Letchworth kaj imagante en pensoj la ĝardenurbojn venontajn, por kiuj Letchworth estas la tipo, oni emas pensi, ke jen estas io atingita, io pli reala ol tio, kion faris iu nuntempa verkanto pri sociaj demandoj.

Tre strange estas, ke S-ro Howard ĝis tiam, kiam la ideo pri ĝardenurboj venis al li, estis stenografiisto ĵetita en la malinteresajn raportojn de parlamentaj debatoj. Mi jam diris, ke S-ro Howard estas revanto, kaj simile al ĉiuj revantoj li ĉiam zorgadas pri siaj revaĵoj. Dum li kondukis min tra Letchworth, li subite sencere monie forlasis min, por konsili al juna laboristo, kie li povas trovi loĝejon. Mi pensis, ke li tute forgesis min dum kelkaj minutoj, ĉar li staris en sia revurbo kaj observis la junan generacion, ĝoje kurantan hejmen el la lernejo. Poste li turnis sin al mi kun peto pri pardono, kaj perlis en liaj okuloj, kiam li montris al la infanoj kaj demandis: „Kiom da tiaj etaj vivuloj savis la ĝardenurbo el la urbegaj kvartalaĉoj?“

Kun permeso de la eldonistoj el la angla lingvo esperantigis

Tagulo

Sporto en Jamajko

Dum unu jarsezono la mar-testudo eliras el la marfundo, fosas en la sablo per siaj naĝiloj profundan truon, naskas en ĝi siajn ovojn — unu-ducent — kaj poste ebenigas la teron. Ĉi tio okazas dum lunlumaj noktoj. Kvankam restas postsignoj, estas iom malfacile, trovi la ĝustan loketon, sub kiu la ovoj estas enterigitaj. Serĉante ĉi tiujn ovojn, oni ĵetas pintigitan bastonon tien kaj tien; sed plejofte „la ludo ne valoras la kandelon“.

En ĉi tiu sezono la enlanduloj serĉas okazon, kapti testudojn, valorajn kaŭze de la viando kaj ŝelo. La eblaj kaptontoj garde stariĝas kaŝitaj kaj tuj, kiam ili vidas testudon sufiĉe malproksime de la marrando, ili rapidas el sia kaŝejo por malhelpi, ke ĝi ree eniru la maron, kaj ili renversas ĝin. Sur ĝia dorso testudo estas

senpotenca. Se ĝi estas grandega kaj vigla, estas tamen tre malfacile ĝin renversi.

Sinjoro, kiu loĝis en sia marborda bieno, estis fervora sportamanto. Iam li promenadis vespere sur la marsablo ne tre malproksime de la marbordo kaj ekvidis testudon. Estis nur iom mallume. „Tro frue“, li pensis. Li reiris hejmen por sciigi la bonegan novaĵon al sia edzino kaj atendi la lunleviĝon. Ŝi gratulis lin: „Vi havas bonŝancon, karulo.“

Inter la infanoj estiĝis ekscitego. „Mi ŝatas verdan la grason“, diris unu el ili. „Mi preferas la viandon spicitan kaj bone bolintan“, diris alia. „Paĉjo“, diris Vilĉjo, la plej aĝa knabo, „post kiam vi estos senŝeliginta la testudon, donu al mi afable la ŝelon, kaj mi faros el ĝi veturilon por la pupoj de miaj fratinetoj.“ „Gekaruloj“, diris ilia patrino, „la kuiristino bone scias kuiru bongustan testudan suppon, kaj morgaŭ vi gustumos eksterordinare bonan tagmanĝon; sed ne faru tian bruon, mi havas kapdoloron.“

Pasis du horoj. La luno ekleviĝis, klara kaj brileta, kaj la sinjoro ree eliris. Vilĉjo iris kun li. Ili devis ĉirkaŭiri de la flanko kaj alproksimiĝi kliniĝantaj, sen bruo. La testudo ŝajnis tiel granda, ke unu homo sola ne povos renversi ĝin. La patro diris mallaŭte: „Rapidu, Vilĉjo, kaj venigu la veturigiston!“ Tiu baldaŭ alvenis, kaj post kiam la sinjoro estis precize klariginta al li kion fari, ili ambaŭ rapidis, kvazaŭ la diablo estus malantaŭ ili, kaj sin ĵetis sur — kion? — lignopecegon nigran, aspektantan kiel testudo!

La patro diris: „Ho ve, la vivo alportas seniluziigojn. Ne maltrankviliĝu, Vilĉjo kara, mi aĉetos beletan veturilon por la pupoj. Sekigu viajn larmojn. Kuraĝe! Estu brava homo!“

Robert Elworthy

La grenadistoj

De Heinrich Heine

Du grenadistoj en Rusland'
Kaptite, Francujon revenis.
Kaj dum haltado en Germanland'
Malĝojon ilin ekprenis.

Ĉar ili aŭdis kun „ho ve!“:
„Francujo estas perdita,
Batita, venkita la grandarme',
Kaj la imperiestro kaptita!“

Ŝiriĝis kuna dolora kri'
Ilia el koroprofundo.
La unu ĝemis: „Ve al mi,
Ho, kiom doloras la vundo!“

La dua: „Tio estas la fin',
La morton mi serĉus prefere,
Sed hejme miaj infano, edzin'
Sen mi pereus mizere.“

„Ne pri edzino kaj infan'
Mi pensas de l' sorto batitaj, —
Almoze ili petu je pan'! —
La imperiestro kaptita!

Jen, frato, mia lasta esper',
Se mi nun baldaŭ mortos,
Por entombigi en franca ter',
Ke hejmen vi min portos.

Per kruc' milita kun ruĝa ruband'
La brusto estu kovrata,
Pafilo estu en la man'
Kaj glavo ĉirkaŭligata.

Kaj mi atentos, brava soldat'
En tombo, preta batali,
Ĝis min ekvekos kanona pafad'
Kaj brua galop' de ĉevaloj.

Jen l' imperiestro super la tomb'!
Mil glavoj brilas sonore, —
Kaj mi armite levigos el tomb',
Por lin defendi fervore!“

(El „*Elektitaj Poemoj*“ de Heinrich Heine,
tradukitaj de *Friedrich Pillath*)

El la vivo kaj sciencoj

Sankta Nikolao

La 6a de Decembro estas la nomtago de l' Sankta Nikolao, la bona hispana episkopo. Estas strange, ke kvankam Nederlando estas ja protestanta lando, oni tre festas tiun ĉi nomtagon. La manieron, en kiu la najbaraj germanoj kaj angloj festas Kristnaskon, oni preskaŭ ne konas tie ĉi; ĝin anstataŭas tute la festo de l' Sankta Nikolao, kiu estas nomtago, kiun ankaŭ protestantoj, izraelidoj kaj liberpensuloj festas. Jam dum la tuta monato Novembro la butikistoj estas preparintaj sin por la festo. La kukistoj faras specialan bakajon, „Sankta Nikolao“, kaj literojn el ĉokolado aŭ el ia alia dolĉaĵo. Multaj novaj libroj aperas, precipe por infanoj. Se oni travidas la ĵurnalojn, oni rimarkas multe da anoncoj, en kiuj la butikistoj publikigas siajn komer-

caĵojn. Libroj, ludiloj, vestoj, ĉiuj servas kiel donacoj. Kompreneble la festo estas plej ŝatata de la infanoj. Jam kelkajn semajnojn antaŭe oni parolas al ili pri Sankta Nikolao, kiu venos el Hispanujo kun nigra servisto kaj alportos donacojn al la bonaj infanoj kaj nur vergon al la malobeantoj. Tial la holandaj infanoj neniam estas tiel obeemaj kiel en Novembro. Dum la nokto de la 5a de Decembro la sanktulo venas. Li rajdas per sia blanka ĉevalo sur la tegmentojn kaj venas tra la kamentuboj en la ĉambrojn. Tial la infanoj antaŭe jam metis ŝuojn aŭ botojn sub la kamenon, en kiuj ili kuŝigas avenon, pizojn aŭ fojnon por la ĉevalo. La antaŭan vesperon la nigra servisto jam venis al la pordoj por aŭdi, ĉu la infanoj estas obeintaj. Ofte li tiam jam jetas sukeraĵon aŭ kukaĵon en la ĉambron. La infanoj aŭdas la voĉon de la nigrulo, kiu demandas pri ili la gepatrojn, kaj multaj infanoj, kiuj ne estis tre afablaj, tiam tremas, sed feliĉe, la Sankta Nikolao estos pardonema, se ili promesas, nun ĉiam esti obeemaj. En multaj familioj kaj ankaŭ en lernejoj por malgrandaj infanoj la sanktulo kun sia griza barbo, sia mantelo kaj sia episkopa ĉapelo mem venas, kaj dank' al lia boneco multaj malriĉaj infanoj ricevas varmajn vestojn kaj povas festeni. Eklezian karakteron la festo ne havas.

O. Chr. D.

Vera travivaĵo

Estis varma printempa tago komence de Majo. La fruktaroj floris bele, narcisoj kaj siringoj plenigis la aeron je agrabla bonodoro en malgranda ĝardeno. Nun venis la vespero. La duonlumo de la krepusko mallevigis sur la florojn, kaj inter la branĉaro de la arboj formiĝis kvazaŭ vualo de la naturo, detenanta ĝin de tro rapida kreskado. Ĉio silentis. Subite, aŭskultu! Ĉu tio ne estas la fajfado de junulo amema? La sono estas gorĝfajfanta, longtirata, tre laŭta, kortuŝe plendanta kaj ripetigas post malgrandaj intertempoj kvin—sesfoje. Strange! — Vidu, vidu tien, sur alta betulo, pli alta ol ĉiuj najbaraj arboj, sidas la fajfanto, turdo, kiu ofte vespere kantis tie siajn bonsonajn kantetojn. La fajfado transformiĝis en la konatan ĝojegon, jen trilo, ŝmaco, fajfeto, per kio la virturdo pasigas la tempon al sia edzineto kovanta en la nesto. Ni aŭskultu! Tiom belega, tiel ĝeme malgaja neniam estis la kanto. Domaĝe, ke ni ne povas kompreni la lingvon de la bestoj. Ni aŭdus nun certe seriozan rakonton pri grava afero el la vivo de la turdo. Aŭskultu nur! Ĉu ne vokas la birdeto karese allogante sian karulinon? Tio estas klaraj vortoj de kora amo, ree petetante per la plej kortuŝaj sonoj de la birdkanteto. Senmove ni aŭskultas kelkajn minutojn kaj ankoraŭ kelkajn, ĝis la devo

nin vokas. Forirante ni haltas. Proksime de la betulo kuŝas sur la tero la senviva korpeto de turdo, preskaŭ ankoraŭ varma. Subite ni komprenas la nun precipe belegan kanton de nia alia amiko sur la supro de l' arbo. Estis la primortinta plendado kantata de la ploranta edzeto. Li kantas ankoraŭ. Ĉu vi ne komprenas la karesan flaton de la amo? Ĉu ne ŝajnas peteti la malĝojuleto: venu, venu mia karulineto! Kortuŝate ni aŭskultas kaj komprenas parton de anima vivo de la bestoj. Ni foriras kunsuferante.

Kaj tiajn belegajn kantistojn oni povas kapti per kaptiloj, mortigi kaj manĝi? Ĉu ekzistas pli granda krimo kontraŭ la naturo? Ĉu la homoj estas rabobestoj, kiuj regas la aliajn kreitaĵojn per sia kruda fortenco?

Max Wolter

Lingvaj demandoj

Kiam vi uzas la prepozicion „por“?

Por esprimas celon.

Ekzemple: La esperantistoj laboras por la disvastigo de Esperanto, ili varbas anojn, por ke ili lernu la lingvon. Propagando por la ideo de internacia lingvo estas necesa.

Kiam oni uzas la prepozicion „per“?

Per esprimas la rimedon, la manieron.

Ekzemple: U. E. A. per Esperanto utilas al komerco, turismo, sporto, scienco ktp. Per Esperanto oni nun facile vojaĝas.

Kiam oni uzas „pri“?

Pri esprimas la temon de ago.

Ekzemple: La Akademio zorgas pri la unueco de la lingvo, la Lingva Komitato zorgas pri la konservo kaj defendo de la Fundamento, ĝi pripensas kaj observadas la naturan evoluon de Esperanto.

Kiam vi uzas la prepozicion „pro“?

Pro esprimas la kaŭzon, la motivon.

Ekzemple: Pro admiro al la genia elpenaĵo de Dro Zamenhof la tuta esperantistaro fervore laboradas, pro entuziasmo ĝi ne timas danĝerojn, pro pasia amo al nia sankta afero la esperantista popolo batalas kaj venkos.

Pri la uzado de „pli maljuna“ kaj „pli aĝa“

Tial ke la prefikso *mal* esprimas ĉiam la „malou“ de iu ajn ideo, oni uzu rilate al junaj personoj ne *pli maljuna*, sed *pli aĝa*.

Ekzemple: Karlo, kiu estas dekjara, havas pli junan fratinon; li do estas la *pli aĝa* infano de siaj gepatroj. Sed: Tiu maljunulo povas marŝi ankoraŭ tri horojn sen interrompo, kaj mia onklo, kiu estas *pli maljuna* ol li, supreniras ankoraŭ la plej altajn montojn.

≡ Tra Esperantujo ≡

Raporto pri Esperantaj verkoj rekompen- citaj de la Akademio

Kun bedaŭro la Akademio konstatis, ke tre malmultaj estis la prezentitaj verkoj. Niaj eĉ plej gravaj firmoj kaj plej rajte famaj verkistoj sin detenis — sendube pro neatento aŭ nescio — de ĉiu prezentado.

Ŝajnis tamen bone al la Akademio, rekompenci jam nun kelkajn el la *regule* proponitaj libroj kun la espero, aliri tiamaniere la atenton de la interesataj personoj.

Ĝi estus feliĉa, se proksiman jaron multaj estus la kandidatoj kaj precipe, se gravaj ili estus kaj tiaj, ke ĉiam pli severa kaj sekve pli konsiderinda kaj signifa fariĝus la akademia rekompenco.

Bone estus, por atingi tian rezultaton, ke la Esperanta gazetaro helpu pli ol ĝi faris, por konigi la akademian konkurson kaj ĝian regularon (vidu „Tutmonda Jarlibro Esperantista 1914“, pĝ. 11 (verda), *Regularo pri verkoj rekompencaj de la Akademio* kaj „Oficiala Gazeto“, n-ro 7 (62), 25. Januaro 1914, *Aldono al la Regularo*).

Ni opiniis pli saĝa kaj pli deca, ne montri en tiu ĉi raporto la — kvankam bonajn kaj interesajn — ne rekompencajn verkojn, tial ke tio povus tute malprave ŝajni al kelkaj ia speco de malaprobato.

Estis elektataj per 7 aŭ 8 voĉdonoj (10 Akademianoj voĉdonis, 2 ne voĉdonis) jenaj verkoj, kiuj de nun havas la rajton al la surskribo „Rekompencita de la Akademio“:

Estu Homo! de Charles Wagner, el la franca lingvo tradukita de Sam. Meyer;

Rikke-Tikke-Tak de Hendrik Conscience, el la flandra lingvo tradukita de Maria Posenaer;

Mirinda Amo, romano originale verkita de H. A. Luyken;

La Vendetta, novelo de H. de Balzac, tradukita de Marcel Merckens;

Rolandkanto, tradukita de Dro Noël.

Ili ĉiuj sin rekomendas per plene fundamenta korekteco en la stilo, kio estas la unua kondiĉo, por meriti rekompencon, kvankam ne la sola.

Estu Homo! — Bonega traduko, bonega enhavo, senerara presado, tiaj estas la kvalitoj, kiujn konstatis en tiu ĉi verketo la Akademio, kaj kiujn ĝi intencis rekompenci.

Rikke-Tikke-Tak — Stilo agrabla, emociplena. Ne tre verŝajna, kelkafoje iom infana estas la rakonto, kiu tamen ĉiam estas interesa, alloga kaj ofte korusanta.

Mirinda Amo (originalaĵo) enhavas multajn ĉarmajn paĝojn, kiuj plaĉos eĉ al neanglaĵ legantoj, kvankam certe la romano estas pli angla ol internacia. „El lingva vidpunkto *Mirinda Amo* montras tre grandan progreson kompare kun *Paŭlo Debenham* de l' sama aŭtoro. La stilo estas pli eleganta, pli flua; la aŭtoro malpli ofte uzas la kunmetitajn vortojn; la neologismoj estas malmultaj kaj preskaŭ ĉiam klarigitaj.

kelkaj gramatikaj eraretoj enŝoviĝis en la libron, sed ili estas ne gravaj."

La Vendetta — Tre interesa, tre „drama“ novelo de fama franca verkisto, tre lerte tradukita — kun vere Esperanta kaj fundamenta konscienco — de talentoplena junulo, kiun tro frue por liaj amikoj kaj Esperanto forrabis senkompata morto.

Rolandkanto — Tiun ĉi epopeon, kun mirinda fideleco verse tradukitan, legos kun vera plezuro tiuj, kiuj ŝatas la militeman poezion de la mezepoko. Por la francoj ĝi ludas saman rolon, kiel la *Nibelungenkanto* por la germanoj. Firmaj, korektaj, preskaŭ ĉiam elegantaj estas la versoj de Dro Noël.

Paris, la 15an de Julio 1914

Th. Cart

(El *Oficiala Gazeto*, n-ro 2 (68), 25. Julio 1914)

Diversaj komunikoj

Sciigoj pri E. L. A.

Devizo: „Nia diligenta kolegaro
En laboro paca ne laciĝos.“

Ĉar la administracio de la Esperantista Literatura Asocio sidas en Germanujo kaj ĝia Bulteno aperis en Paris (*Oficiala Gazeto*), raportoj nun ne povas esti skribataj. Tial *E. L. A.* danke akceptas la permeson, publikigi kelkajn liniojn ĉiumonate en Germana Esperantisto. Unue ni diru al legantoj, kiuj eble ne konas la celadon de *E. L. A.*, la jenon: *E. L. A.* estas unuigo de verkistoj kaj literaturamantoj, kiuj reciproke sin helpas ĉe la eldono de libroj. Germano legas italan, italo anglan manuskripton ktp., por ke naciismoj kaj nekomprenablaj esprimoj estu forigataj antaŭ la presado. Ni celadas bonegajn, senerarajn librojn. Artikolojn por gazetoj ni ne kontrolas, tio estas tasko de la redaktoroj. Ni ne estas „korektanta klubo“, ni ankaŭ ne estas eminentularo, kiu helpas al komencantoj, ni estas egalranga kolegaro.

La lastaj du libroj, kiuj aperis sub niaj aŭspicioj, estas „For la batalilojn!“, tradukita de A. Caumont kaj „Elektitaj Poemoj“ de Heinrich Heine, tradukitaj de F. Pillath. Al ambaŭ libroj ni deziras bonan sukceson. La nuna tempo ne estas favora al eldono de novaj libroj. Ni tial petas niajn kolegojn, ke ili diligente laboru por la gazetoj, kiuj ankaŭ nun kuraĝe aperas.

Al la tuta samideanaro ni esprimas gravan, seriozan peton: bonvolu nun malavare aĉeti librojn. Novaj momente ne aperos, aĉetu la malnovajn. Multaj el ili estas bonegaj, ili meritas duan eldonon. La eldonistoj, kiuj vendis sian provizon, volonte riskos novan entreprenon. Kiam denove paco regos sur tero, novaj ideoj kaj impulsoj instigos la homojn. Nova vivo elkreskos el ruinoj, la nedetruenda nova sento denove forte sin montros, ĝis ni atingos la celon en gloro.

Marie Hankel

La proksima numero aperos
la 20an de Januaro 1915!

Bibliografio

Ĉiuj libroj markitaj per steleto estas riceveblaj per:

Ader & Borel G. m. b. H., Esperanto-Verlag, Dresden-A. 1,
Struvestraße 40.

(La montritaj prezoj ne entenas la sendkostojn, se tio ne estas dirita.)

Ĉi tie ni recenzas nur verkojn duoble ricevitajn.

* **Elektitaj Poemoj** de Heinrich Heine. Tradukitaj de Friedrich Pillath. 36 pĝ., 12×16 cm. — Eldonita de F. W. Rohden, Essen-Ruhr. 0.250 Sm. [265

Kun granda emocio mi legis „Elektitaj Poemoj“ de Heinrich Heine, tradukitajn de nia samideano Pillath. La antaŭparolo havas la daton de la 1a de Aŭgusto 1914. Ĉu nia koro ne ehas la devizon de la verketo:

Mi komence malesperis,
Pensis, ne toleri ĝin,
Kaj mi tamen ĝin toleris —
Kiel? — Ne demandu min.

Ĉu oni povas esprimi pli vere, pli kortuŝe homan doloron? Buŝo de poeto scias eldiri tion, kion ni ĉiuj sentas, tio ja estas lia talento, pro kiu ni estas dankegaj. Legante kaj relegante la 15 elektitajn poemojn oni ĉiam denove sentas la dolĉan kaj maldolĉan emociion de sufero, sopiro, amo, ĝojo kaj kompreno. Ankaŭ satiro ne mankas kaj nobla rezignacio finas la verkon.

Ho, pardonu! Mi ja nur parolas pri la poeto, la fame konata Heinrich Heine! Mi forgesis la tradukinton, mi forgesis, ke mi ne legis la originalon. Tiel mirinde bona estas la traduko, ke oni sentas la sorĉon de la Heinea poezio sen ia manko. Kiu jam ŝatas la poeton, ankoraŭ pli admiros lin; kiu per Esperanto konatiĝos kun li, estos danka al la tradukinto kaj al la elpensinto de lingvo, kiu disvastigas veran poezion en la tuta mondo.

Kiam esperantisto estonte je festotago donacos florojn al samideano, tiam li aldonu la Elektitajn Poemojn. Li certe per tio kaŭzos multe da ĝojo. La floroj velkos, la poemoj restos. R.

* **Karaktero** — Laŭ Mr. J. M. van Stipriaan *Luiscius*, advokato en Hago. Tria plivastigita kaj plibonigita eldono. Tradukita de J. L. Bruijn laŭ la 8a eldono de l' nederlanda originalo. 32 pĝ., 13½×19 cm. — Librejo „Espero“, Hago. 0.250 Sm. [213

Jam estas la tria kaj korektita eldono de ĉi tiu interesa verketo kaj stile la plej bona el la tri. Jam antaŭ du jaroj mi iom severe kritikis la unuan eldonon, poste la duan, kaj nun mi ĝojas, ke ĉi tiu tria eldono ne plu meritas tiajn ripocojn. *

La enhavo estas vere interesa, kvankam ne nova; tamen estas tre bone, se oni ofte, de tempo al tempo, legas pri tiaj temoj: „Kiel oni formas karakteron?“ La verkinto donas al ni obeindajn konsilojn. Fine mi volas citi nur kelkajn subtitojn el la tuta listo: I. Kio estas karaktero? II. Kiel oni formas karakteron? III. El kio konsistas bona karaktero? Bon-

voleco — Ĝentileco — Memregado — Pacienco — Veramo ktp. ktp.

Nun, dum la longaj vesperoj estas tre agrable, legante aŭskulti la interesplenajn parolojn de l' Hag' a advokato. La 32 paĝan libreton kun beleta eksteraj mi tre rekomendas.

Ch. Pulvers (L. K.—E. L. A.)

*

* La Mizeruloj — De Victor Hugo. Esperantigis Centezimala. Unua volumo. Serio da eldonaĵoj de „Internacia Socia Revuo“, Noj. 9—12. 112 pĝ., 10^{1/2} × 17^{1/2} cm. — Eldonejo: W. Nutters, Amsterdam. Pr: 0.400 Sm. [210

Kun vera ĝuo ni flue povas legi la tre bonstilan tradukon de ĉi tiu fama verko de l' same fama aŭtoro. Mi ĝojas, ke ni ree havas en nia Esperanta literaturo bonan tradukon de bona verko.

Ke la traduko fariĝis el franca lingvo, ni jam sur la unua paĝo povas devini; kaj pro kelkaj franc-lingvaĵoj mi ankaŭ konkludas, ke la tradukinto estas franc-lingvano. „damnito“ — mi ĝin trovis nek en Plena Klasika Libro, nek en Vortaro de Kabe; mi preferus: kondamnito. „Kontinui“ mi ankaŭ ne legas en Plena Klasika Libro, same „rigora“, „amara“ k. c. La vortformon „repreni“ (reprenire) por daŭrigi, ree paroli, respondi, mi ankaŭ ne ŝatas (re=preni, ree preni!). „Literulo“ (pĝ. 14): homme de lettres (liter=ulo!) — prefere: saĝulo, instruata homo, literaturisto.

Plue la mallongigon de l' artikolo la tradukinto ofte faris laŭ franca metodo, anstataŭ laŭ Esperanta regulo: „por l' animo“, „la konkordon — l' aŭroron“, „Sinjoro l' episkopo“, „en l' akvo“ ktp. — „La episkopo sentis, eble sen klare konscii . . .“ — prefere: eble neklare konsciante . . . ; „senĝeni la episkopon per vorto . . .“ — prefere: ne ĝenante la . . .

Sed, se ni ne konsideras ĉi tiujn kelkajn evitataĵojn, ni havas antaŭ ni ĝuigan tradukon treege rekomendindan. Ĉiu esperantisto havigu al si ĉi tiun verkon.

Ch. Pulvers (L. K.—E. L. A.)

≡≡≡ Por lertuloj ≡≡≡

Enigmaj kaj problemoj

No. 28

Nombra enigmo

3 4	ligvorto (konjunkcio)
5 9 7 2	trinkaĵo
6 3 2 6 3 2	produktaĵo el vino
10 3 5 9 2 9 8 6	antikva konstruaĵo
1 2 3 4 5 6 7 8 9 10	ilo de la seruristo
6 3 2 3 8 6 7 10	danco
2 3 5 3 2 5	kreskaĵo
10 3 4 2	arbo
3 2	mezuro

Anstataŭu la nombrojn per literoj tiamaniere, ke la horizontalaj vicoj donas vortojn de la apudstaraj signifoj.

Alfred Müller

No. 29

Interlig-enigmo

ado, ano, bojo, du, galo, ho, ir, kato, kolo, lando, nom, ora, rum, uro.

El la 14 vortoj formu 7 kaj ordigu ilin tiel, ke la komencliteroj nomos migrantan birdon.

Majo

No. 30

Kun „a“ min bezonas la metiisto;

Kun „i“ mi kreskas en la arbaro.

En la venonta numero de eldono B ni publikigos la solvojn de la ĉi-supraj problemoj. La divenintoj bonvolu sendi la solvojn, skribitajn nur sur poŝtkarto sen iu alia komuniko, ĝis la 10a de l' venonta monato al nia redakcio en Dresden-A. I, Struvestr. 40. — Tri el la solvintoj ricevos libropremion, kiun ili povos elekti el la katalogo de nia eldono. (Valoro de ĉiu premio ĝis 1 Sm.).

La gajnontoj bonvolu sciigi al nia eldono, Ader & Borel G. m. b. H., Dresden-A. I, Struvestr. 40, la librojn, de ili deziratajn.

Nia provizo de taŭgaj enigmoj kaj problemoj estas preskaŭ elĉerpita. Volonte ni akceptas novajn kaj kun kora antaŭdanko petas pri alsendo.

Solvoj el la antaŭa kajero

No. 25

L a d o
a l e n o
b a l e n o
a r a n e o
t a v o l o
a d i c i o
l i v r e o
o z o n o

La batalo de la vivo

No. 26

L i — a n — L i a n o

No. 27

n u l o — l u n o — u l n o

Ĝustajn solvojn sendis

1) de ĉiuj numeroj: Kurt Härtel, Bad Berka; Unteroffizier d. R. W. Knopf, z. Zt. verwundet in Beuthen (Oberschl.); Gefreiter Hugo Rönisch, z. Zt. Bischofs- werda; Ad. Appelt, Gablonz; Max Butin, Godesberg; Theodor Oster, Godesberg; E. Mombel, Honnef; Henny Drückhammer, Lübeck; E. Werner, Siegmars; Richard Stauss, Stuttgart.

2) de du numeroj: Lydia Oesterreich, Dresden; E. Ulitzsch, Gera (Reuss); Walter Lippmann, Leipzig; Max Fischer, Weida (Thür.).

La premiojn gajnis per loto: S-ro Kurt Härtel, Bad Berka; F-ino Henny Drückhammer, Lübeck; S-ro Rich. Stauss, Stuttgart.

Fino de la redakcia parto